

Leteroj de Tigro (1)

この号から、第59回関東大会で「中国 1946-76 知られざる歴史」という題で講演をしてくださったビル・マックさん(写真)の連載が始まります。お楽しみに。



Reciproka lernado kaj klera ligo inter Ĉinio kaj Japanio

Jam pasis tri jaroj ekde mia alveno en Japanio kiel *kokuhi-ryūgakusei* en Kiota Universito, kun ĝenerosa subteno de la japana registara burso. Retrospektive, tempo trapasis tro rapide, farindaj aferoj nefaritaj tro multas kaj mia japana lingvokapablo ankoraŭ plibonigindas. Tamen, dume almenaŭ mi kompletis mian doktoran tezon kaj ekde venonta jaro ekinstruos la sanskritan lingvon kaj budhisman filologion en la Universitato de Honkongo. Sed dank' al diversaj daŭrigendaj projektoj tie ĉi en Japanio, dum la venontaj jaroj mi devos veturi reen inter Ĉinio, Hongkongo kaj Japanio. Pro tio mi feliĉe ankoraŭ ne devas diri *sayōnara* al miaj japanaj geamikoj.

Studado en fremda lando estas rara oportuno por profunde kompreni alikulturon. Observado de alieco donas al ni ne nur novan vidpunkton sed ankaŭ novan memkomprenon. Antaŭnelonge mi legis libron de japana junulo Katō Yoshikazu 加藤嘉一, kiu studis en Pekino Universitato kaj poste famiĝis pro siaj verkaĵoj pri observado de Ĉinio. Liaj observoj, foje akraj, foje humora, celas interkompreniĝon inter ĉinoj kaj japanoj, kiu estas grava temo nuntempe. Inspirite de liaj verkaĵoj kaj ankaŭ sufiĉe ofte demandite de miaj japanaj geamikoj pri mia impreso de Japanio kaj kompreno pri Ĉinio, mi sentas, ke mi ankaŭ

verku ion pri Ĉina-Japana rialto, el mia propra vidpunkto - vidpunkto de honkongano mondvojaĝanta. Krome, verku mi en Esperanto, la neŭtrala lingvo. Mi ne scias ĉu verkado en la ĉina aŭ en la japana iel ŝanĝus mian pensmanieron kaj tial ankaŭ la enhavon, sed almenaŭ mi certas, ke en Esperanto mi povas pliklare kaj plirekte esprimi mian opinion kaj senton.

En 2010 dum la Kantō-kongreso en Ĉofu, kiel invitita preleganto mi faris prelegon kun temo “Ĉinio - Nekonataj rakontoj 1946-1976”. En la prelego, mi klopodis klarigi pri la politika kaj social disvolviĝo de moderna Ĉinio kaj ties efikoj al nuntempa Ĉinio. Post la prelego, iu ĉina partoprenanto demandis al mi, kial mi elektis tian “nemenciindan” temon - pri la detruoj de tradiciaj kulturoj kaj konstruo de nova naciismo. Sed por mi ekzakte la “nemenciindigita” historio klarigas multajn fenomenojn en Ĉinio aliel neklarigeblajn. Ni ĉiam lernu de historio, ĉu ĝoja ĉu malĝoja, ĉar kiam ajn la plej multo de la popolo forgesas pri la tragedio pasinta, ripetas la sama tragedio - ĉu pro naciismo, ĉu pro ajnaj ekstremaj, netoleraj ismoj, kiuj estas kreskantaj alarme en ambaŭ Ĉinio kaj Japanio.

Mi sentas, ke kiel iu, kiu vivas kvazaŭ inter Ĉinio kaj Japanio, mi ofte vidas ion, kio ne videblas al ĉiuj. Ofte mi ŝokiĝas pro la nescio de kaj ĉinoj kaj japanoj pri unu la aliaj. La antaŭjuĝoj estas profundaj kaj ofte oni simple preterpasis silente, ĉu pro manko de rimedoj, ĉu pro manko de solvoj. Tre gravas, tamen, ke oni rekonu la variecon ene de popolo. Same ke la vidpunkto de la japana registaro ne reprezentas la opinionojn de ĉiuj japanoj, kaj certe ne tiujn de multaj miaj propraj japanaj konatoj, la vidpunkto de la ĉina komunisma partio aŭ la ĉina registaro ankaŭ ne reprezentas la opiniojn de ĉiuj ĉinoj, kaj certe ne la miajn. Cetere pro historikaj kialoj, ĉinoj de Ĉinio, Tajvano kaj Honkongo havas tre malsamajn sintenojn. Pro tio antaŭe ĉi-jare kiam JEI invitis min fari prelegon pri Ĉinio kun proponita temo “Kiel ni pensu pri Ĉinio” por malkreski “malŝato aŭ eĉ malamo al Ĉinio”, mi simple devas rifuzi. Mi ne defendu kaj mi ankaŭ ne povas defendi la vidpunktojn de la registaro. Tio estas la laboro de politikistoj. Sed kiel multaj samideanoj, mi kredas je paco per interkompreniĝo. La falsajn

informojn, kiuj rezultigas misjuĝojn kaj antaŭjuĝoj oni nepre forigu; la helpajn kaj ĝustajn informojn oni laŭeble disvastigu.

Antaŭ pli ol mil jaroj, Japanio sendis *kentōshi* al Ĉinio. Ili revenis al Japanio kun kulturaj trezoroj kaj scioj, kiuj transformis Japanion kaj antaŭenpuŝis la japanan civilizacion. La situacio renversas en moderna tempo post *Meiji*-reformado. Ĉinio sub *Qing*-regnado stagnis kaj nur en 1905, *keju* 科舉, la anakronisma imperia ekzamena sistemo estis aboliita. Pro tiu prokrasto kaj ankaŭ subpremo de koloniismo siatempe, la edukado de Ĉinio de la fina parto de 19a jarcento estis tre malforta kaj ekde tiam multe dependis je Japanio. En la frua parto de la 20a jarcento, gravaj ĉinaj intelektuloj kiel Zhang Taiyan 章太炎, Wang Guowei 王國維, Liang Qichao 梁啟超, Lu Xun 魯迅, Guo Moruo 郭沫若 kaj multnombre aliaj studis en Japanio kaj poste transformis Ĉinion diversmaniere – fakton, kiun nuntempaj ĉinoj iom post iom rekonas. Sed la fakto estas verŝajne se oni simple studus la vortojn de moderna ĉina lingvo, en la fakoj de sciencoj, filozofio kaj kulturo, kiuj estis fakte prunitaj de la japanaj neologismoj elpensitaj dum la Meiji-periodo.

Pro la ĝenerala kresko de Japanio dum la pasinta jarcento kaj la ĥaoso de Ĉinio dum la plejmulto de 20a jarcento, Japanio kiel societo superas Ĉinion multflanke. Kiel studento de kulturo, mi ofte pripensas kulturajn aferojn - kiel nia denaska kulturo influas kaj difinas nian sintenon kaj valoraron - kaj eventuale la sorton de individuoj aŭ eĉ la nacio kolektive. La japana kulturo estas tre bunta. Ĝi konservas ofte la plej konservindajn partojn de sia kultura heredaĵo, ĉu materialaj objektoj kiel temploj aŭ sennombraj kulturaĵoj, ĉu nematerialaj aferoj kiel etiketoj aŭ aliaj spiritaj trajtoj. Samtempe ĝi enhavigis ankaŭ fremdajn elementojn, transformitajn aŭ eĉ plibonigitajn, ĉu teknikaj produktaĵoj kiel ĉiaj elektronikaĵoj, ĉu “curry” el Barato.

En Ĉinio, la situacio estas tute malsame. Ekde la komenco de la 20a jarcento, multaj intelektuloj elektis la vojon de ekstremismon kaj proponis forigon de sian tradician kulturon. La komunisma ĉina registaro ekde 1949 adoptis tiun kontraŭ-tradician sintenon kaj samtempe ankaŭ tre singardan kaj kontraŭ-fremdan sintenon, kvankam

komunismo estis mem tre fremda ismo en la kunteksto de ĉina kultura kaj socia disvolviĝo. Pro tio, Ĉinio havas tute novan kaj eĉ strangan kulturon, fortranĉite de sia jarmila tradicio. Cetere la fama gvidlibro “Lonely Planet” juste klarigis al vizitantoj al Ĉinio, ke se oni serĉus veran ĉinan kulturon, ne iru al Ĉinio sed al Tajvano aŭ Honkongo. Tie ĉi en Japanio, ŝajne oni ofte imagas, ke laŭta parolado kaj muziko, ruĝaj objektoj, emociplena kaj rekta esprimado estas parto de “ĉina kulturo”, samkiel trankvileco, “*wabi-sabi*” estetiko, etiketo de nereakta esprimado k.t.p. ekzempligas la japanan kulturon. Sed la fakto estas, ke tiaj trajtoj de moderna ĉina kulturo disvolviĝis el tute eksterordinaraj cirkonstancoj. Ili certe ne iel ajn reprezentas ĉinan kulturon en mia kompreno. Cetere, multaj honkonganoj kaj tajvananoj certe oftendiĝas se japanoj tiel pensas.

Revenante al mia originala temo pri interkompreniĝo, reciproka lernado kaj klera ligo inter Ĉinio kaj Japanio, mi ŝatus emfazi, ke en ĉiuj ajn kulturoj kaj societoj, oni devas rekoni tiun, kiu estis valora kaj distingi inter la bona kaj malbona. La *kentōshi* lernis la bonajn esencerojn de la ĉina kulturo dum Tang-dinastio, same la ĉinaj intelektuloj tion faris en Japanio je la komenco de la 20a jarcento. Tio estas la klera ligo inter la du nacioj historie. Ĉu la du nacioj nun iel lernu de unu la aliaj? Certe de la ĉina flanko, ĉinoj multe lernu de Japanio, ĉar Ĉinio estas tute nova nacio, konfrontante multajn gravajn problemojn kiel median poluadon, energian kaj finan kan krizon kaj maljuniĝantan demografion – problemojn, kiujn Japanio jam traktadas dum jardekoj. Kaj kio pri kulturo? Veninte al Japanio, mi sentis ke Ĉinio estis kvazaŭ kultura ruino. Ni ĉinoj perdis grandparte nian tradicion pro la ekstermista memdetruo. Ĉinio stagnis kulture kaj teknologie pro manko de sinceraj interŝanĝoj kun aliaj kulturoj, malfermante arogante sian pordon en 19a jarcento. Sed la futuro estas brila kaj esperplena, ĉar tutglobiĝo kaj novaj teknologioj de 21a jarcento ebligas kaj ankaŭ devigas pliliberan komunikadon. Ĉinio jam fariĝas giganta najbaro de Japanio. Pere de amikaj interŝanĝoj kaj daŭra interkompreniĝo, la du nacioj certe kune prosperos.

- Tigro (bill.m.mak@gmail.com)